# *Alvoko al kunfestado la unuan de majo.*



La centralo de kubaj laboristoj publikigis alvokon al la insula laboristaro kunfesti la internacian tagon de la laboristoj la 1-an de majo kun la sindevigo altigi la kontribuon al la ekonomia kresko bezonata de la lando.

En la alvoko oni proponas transformi ?i-okazon en komunan feston de la laboristaro kun la kamparanoj, la intelektuloj kaj ?iuj kubanoj,  por plenumi la celojn plibonigi la kuban socion cele al prospera kaj da?ripova socialismo.

La centralo de kubaj laboristoj kaj ?iaj sindikatoj alvokas la laboristojn, siajn familianojn kaj la tutan popolon partopreni aktive en la kunfestado de la 1-a de majo kaj mar?adi en placoj, avenuoj kaj lo?lokoj.

Estos oportuna momento por ratifi la agnoskon al la monda sindikata federacion okaze de siaj 70 jaroj de aktiva vivo, revolucia kaj kompromitita kun la defendo de la internacia laboristaro.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/nacionales/50854-alvoko-al-kunfestado-la-unuan-de-majo

# Radio Habana Cuba